# Esperanto en Skotlando

Esperanto in Scotland – Esperanto ann an Alba
Numero 208 – Aŭtuno 2018 - £2.50/€3



*Statuo de Kristo la Reĝo en Lisbono, la UK-a urbo*

Enhavaj Elstaraĵoj – Turismo: Mia Casey – Viktorianaj Azilejoj: Donald Robertson

# Esperanto en Skotlando

**Numero 208 – Aŭtuno 2018 -ISSN 0014-0643**



**Kunredaktoro:** Ed Robertson
**Kunredaktoro:** Hju Rid
**Administranto:** Mia Casey
**Redakcia adreso:** 52 Easter Drylaw View, Edinburgh, EH4 2QP
**Telefono:** 07970 156549
**Rete:** ed.robertson@esperanto.org.uk aŭ hju_rid@yahoo.co.uk


La redakcio bonvenigas kontribuaĵojn ĉiaspecajn: artikolojn, novelojn, novaĵojn, recenzojn, poemojn, leterojn, ktp. Limhoro por la venonta kajero de **Esperanto en Skotlando: noktomezo, 31a de marto 2019.** Oni sendu kontribuaĵojn elektronike kiel simplan tekston aŭ uzante la formaton OpenOffice.org Writer aŭ LibreOffice Writer (senpage haveblaj de la koncernaj retejoj). Dokumentoj en la formato Word ankaŭ estos akceptataj. Se la formato aŭ tiparo uzata en via kontribuo ne subtenas ĉapelitajn literojn, diversaj surogataj sistemoj estas akcepteblaj, prefere la x-an por plej facila komputila trakto.

## Enhavo


El Katedro....3
Skota Kongreso en Perth....5
Eĉ plia unu Herezaĵo....7
Semajnfino En Barlaston....8
Manlibro pri la Viktoria Azilo....10
Feriaj Kontrastoj....13
Turismo....25
Ferio En Orkadio....32
Kalendaro....34


La opinioj esprimitaj en Esperanto en Skotlando ne nepre kongruas kun tiuj de Esperanto en Skotlando aŭ EAS. Esperanto en Skotlando estas publikaĵo de la

**Esperanto-Asocio de Skotlando: SC042398**


**Prezidanto**: Jean Bisset
**Vic-Prezidanto**: Simon Varwell
**Sekretario**: David Bisset
**Kasisto**: David Hannah



**Adreso**: 47 Airbles Crescent, Motherwell, ML1 3AP
**Telefono**: 01698 263 199
**Rete**: sekretario@skotlando.org

# El Katedro

## Mejloŝtona verko (aŭ kilometroŝtona verko se vi preferas, mi jes)

Tra la jaroj, Esperanto foje travivis falsajn tagiĝojn, verajn malvenkojn kaj ne malofte, trompajn pretendojn. Eblis tamen ĉiam esperi, ke oni iam komencos trovi esperigajn ŝpuretojn. Unu el tiaj ŝpuretoj estas la nuna pli realisma sinteno rilate kiel ni en Esperantio prezentas nin: ne plu estas asertoj, ke Esperanto savos la mondon aŭ ke ĝi estas solvo al la (oni devas konfesi) multaj problemoj de la mondo. Tamen, ni ja ĝuste rajtis havi sintenon, ke estus bona ideo se homoj komprenus unu la alian pli bone, kaj eble eĉ ke per tio niaj vivoj estus pli interesaj.

Ni, kiuj dum multaj jaroj uzis Esperanton por vivi pli internacian kaj pli internaciecan vivon jam scias tion. Tamen, lastatempe, nia hobio akiris pli da adeptoj kiuj samsintenas, post longa periodo de stagnado. Al niaj vicoj denove aldoniĝas novaj kaj ofte junaj vizaĝoj. Ne temas nur pri la centmiloj kiuj efektive nun lernas nian lingvon pere de la retejo kaj apo Duolingo. La ekstera mondo ankaŭ komencas rimarki nin denove. Kaj unu simptomo de tio estas la fakto, ke nova, tute moderna Esperanto lernolibro nome nun eldoniĝas de amasmerkata eldonisto en Britio unuafoje depost multaj jardekoj.

Tiu nova lernolibro estas "Teach Yourself: Complete Esperanto" de Tim Owen kaj Judith Meyer, kiu aperos en librovendejoj ekde la 4a de oktobro 2018. Kvankam ne eblis recenzi ĝin nun (tio sekvos en la venonta eldono de Esperanto en Skotlando), mi rekomendas ĝin senhezite. Mi aldone rekomendas al ĉiu, precipe al tiuj, kiuj eble nombras la groŝojn, ke oni mendu ĝin de la libroservo de la

Esperanto-Asocio de Britio ĉe esperanto.org.uk aŭ telefone 0845 230 1887 (ene de Britio) aŭ 0044 1782 372141 (ekster Britio), retpoŝte eab@esperanto.org.uk, kaj eblos de tie ricevi la novan libron pli favorpreze ol vi trovos en komercaj vendejoj.

Bonan legadon, kaj aĉetu ekzempleron por amiko.

*Ed Robertson*

# Skota Kongreso en Perth



*Nina Pietuchowska prelegas pri la praarbaro de Białowieża*

Dum semajnofino en Junio, skotoj kunvenis kun Esperantistoj el Anglio, Francio kaj Pollando por partopreni en la 113a Skota kongreso de Esperanto. La kongresejo estis la Hotelo “Royal George” en la historia urbo Perth, kie ni ĝuis bonvenigan bufedon, kaj sekvis teo/kafo kun skotaj buterkeksoj dum la sekvaj tagoj. La hotelo proponis rabaton por tiuj, kiuj intencis tranokti tie - sen laŭŝajne ke iu klarigis tion al la stabanoj, do iom da marĉandado necesis!

Tra la kongreso estis serio de informaj prelegoj; Duncan Thompson parolis pri la duuma matematiko uzata en komputiloj, kaj

la misteraj eblecoj de kvantuma komputado. (Tiu prelego vere estas je la nivelo de la Internacia Somera Universitato ĉe UK-oj!). Ed Robertson prelegis pri la enloĝantoj de la urbo Perth tra la jarcentoj. Gastparolanto Nina Pietuchowska prezentis la historion de Bjalistoko (kun fotoj kiuj montris kiel ĝi aspektis kiam Zamenhof loĝis tie), la praarbaron de Białowieża (kun belaj fotoj pri la plantoj kaj bestoj tie), kaj tiklan kvizon pri Esperanto-temoj. Hju Rid montris fotojn pri la Aŭstralia urbo (ankaŭ-nomata) Perth, ties arkitekturo, ties subĉiela viv-maniero, kaj la ĉirkaŭa naturo.

La Skota urbo Perth sidas je la rivero Tay. Tio ligas kun la lago Tay, kien ni ekskursis por viziti fer-epokan muzeon. Tie oni rekonstruis domon super la lago (sur stangoj). Ni vidis elmontrojn pri fer-epokaj metioj, kaj (malgraŭ la malseka vetero) Hju sukcese kopiis tion por fari fajron, uzante arkon por turni stangon rapide ĝis fulmo aperis. Tiu vizito finis per lunĉo en restoracio kun bela vidpunkto trans la lago, kie ni ĝuis skotajn frandaĵojn, ekzemple “Cullen Skink” (krema fiŝ-supo).

Dum diversaj ripoz-paŭzoj en la kongresa programo mi kaptis la okazon por viziti en Perth la urban muzeon, la Fergusson arto-galerion, kaj muzeon pri la Skota taĉmento “Black Watch”. Perth vere estis bona elekto por kongresurbo; sufiĉe kompakta por tra-promeni, tamen kun multon por vidi.

Kiel postkongresa ekskurso, ni vizitis la apudan urbon Dundee, por vidi la historian ŝipon “Discovery” kaj akompanan ekspozicion pri fruaj antarktaj esploroj. Tiu tago finiĝis per ĝuebla komuna manĝo en apuda drinkejo.

Do… estis bela, interesa kaj stimula kunveno, kun amikema grupo de Esperantistoj. Gratulon al Hju kiu organizis ĝin, kaj la multaj kontribuantoj kiu helpis fari tiel sukcesan eventon.

*Vilĉjo Walker*

## Eĉ plia unu Herezaĵo

Komplikaĵoj en la lernado de Esperanto estas la multsenceco de la vorto ‘de’. Ĝi havas tro da signifoj! Rigarde ĉi tie por kalkuli kiom da ĝi havas: http://vortaro.net/#de

Estas akceptinde metafore etendi bazan signifon en aliajn kampojn, sed videblas pro la multaj konsilaj rimarkoj rilataj al nur unu eta vorto, ke la multsignifeco de ‘de’ estas troa. Ĝi eĉ etendiĝas al la kontraŭa signifo!

Ni vidas en la klarigo de la 11-a signifo sub la rolo B la jenan ‘Kiam oni havas por esprimi nur la objekton ekzemple *nutrado de la infanoj*, oni povas anstataŭigi ‘de’ per ‘al’: *nutrado al la infanoj*.’

Ho! Kio, homoj? Oni freneze esprimas ‘de’ per la mala koncepto ‘al’?!?!

Zamenhof jam saĝe alprenis la vorton ‘da’ kiam temas pri kvanto aŭ mezuro. Kial ne same saĝe distribui la multaj signifojn de ‘de’ en aliajn novajn vortojn.

Esperantistoj jam pruntis el *Ido* la afiksojn ‘-end-’ kaj ‘-oz-’, do ne estas honte sekve ties ekzemplon rilate la posedan signifon de ‘de’. Ni ne povas sekvi ties precizan solvon, *di*, ĉar la radiko ‘di-’ jam ekzistas en nia lingvo – same pri ‘do’ kaj ‘du’. Sed ni povus esti inventemaj.

Kial ne kiel komenco trovi alian vorton por levi de tiu kompatinda vorteto tiun rolon el la multaj kiujn ĝi portas.

Mia propono estas la jena *den* – simpla aldono de litero. Ekzemple, anstataŭ *la domo de la amiko* ni komencu diri *la domo den la amiko*. La radiko 'den' ne jam ekzistas, do perfekte!!

*Hju Rid*

# Semajnfino En Barlaston

Mi decidis iri al Barlaston por partopreni la someran festivalon/someran lernejon kiam mi aŭdis ke Ed Robertson estos unu el la Esperantistoj kiu gvidos unu el la kursoj dum la semajnfino. Mi bedaŭras ke nun la somera festivalo/somera lernejo daŭras nur unu semajnfinon anstataŭ unu semajnon. Kiam mi partoprenis antaŭe la kursoj daŭris unu semajnon kaj mi povis resti ĉe Wedgewood Memorial College kaj manĝis tie ankaŭ. Nun, pro la fakto ke oni nun fermis la Kolegion mi bezonis trovi alian lokon por resti dum la semajnfino. Viv, en la EAB oficejo menciis al mi pri Travelodge kiu situas en Trentham/Stoke-on-Trent kaj ŝi diris al mi ke ĝi estas sufiĉe apuda por vojaĝi al Barlaston.

Kiel kutime, la somera festivalo/somera lernejo okazis en aŭgusto – de la 18a ĝis la 19a de aŭgusto 2018. Pro tiu kialo, mi decidis vojaĝi al Stoke on Trent vendredon la 17an aŭgusto kaj ankaŭ ĉar mi vojaĝis de Skotlando al Anglio. Mi estas unu el ok Esperantistoj kiu partoprenis la progresantan kurson dum la semajnfino. Alia Esperantisto kiu partoprenis la progresantan kurson venis el Norda Ĉinio sed nuntempe ŝi logas en aŭ apud Reading, Sud-Anglio. Jack Warren estis la instruisto de la kurso kaj mi ĝuis la kurson ĉar Jack Warren estis bona instruisto kaj la temoj, kiujn li elektis, estis tre interesaj.

Sabatan vesperon okazis grupa vespermanĝo ĉe la Plume of Feathers en Barlaston – ne tre for de Wedgewood Memorial College kaj Esperanto House. Ambaŭ kursoj okazis en Esperanto House mem kaj mi estis en la Butler Biblioteko, malantaŭ la oficejo de Viv. Entute, estis dek kvin Esperantistoj ĉar nur estis kvin Esperantistoj en la progresinta kurso kiun Ed Robertson instruis. Unu de la Esperantistoj en la grupo de Ed estis Sammy kiu pasint-

jare ĉeestis la Sabatrondon en Lockerbie. Dimanĉon, post la fino de ambaŭ kursoj, Viv diris al ni ĉiuj en la progresanta grupo ke estos prezentado por Esperantisto kiu ne sciis ke ĝi okazos – fakte, la prezentado estis por Sammy ĉar sajnis ke li iros al Toulouse en Francio por ok monatoj kiel voluntulo. Mi opiniis ke tiu evento aldonis ion specialan al la semajnfino ĉar ĝi estis neatendita. Certe, mi tre ĝuis la semajnfinon kaj mi ankaŭ ĝuis tre bonan etoson en Barlaston.

*Sheila Henderson*

## Manlibro pri la Viktoria Azilo

Tiu ĉi interesa libro priskribas la mondon de la 19a jarcenta mensa azilo kaj estis eldonita en 2014 en la angla kiel *Life in the Victorian Asylum* fare de Mark Steven. La libro estis anoncita en Amazon kaj mi aĉetis ĝin, ĉar mi deziris kompari la traktadon de la frenezuloj dum Viktoriaj tempoj kun la traktado en mensaj malsanulejoj ĉe la komenco de la Nacia Sanservo.

Mi estis iom surprizita pri kiel humana kaj enlumiĝinta la Viktoria sistemo ŝajnis esti en la traktado de la frenezo, precipe kiam oni legas pri kondiĉoj en la malriĉulejoj kaj malliberejoj de tiuj tagoj. Iuj el la terminoj uzataj por priskribi la pacientojn en Viktoriaj tempoj estus malaprobitaj nuntempe. Ili estis alluditaj kiel malriĉulaj frenezuloj kaj idiotoj, plimulto de kiuj estis akceptitaj de la malliberejoj kaj laborejoj.

Informo estas donita pri la akto de parlamento kiu ebligis meti la pacienton en la sekuran medion de la azilo por ilia sekureco kaj la sekureco de la publiko. La medio, la konstruaĵoj, laborejoj, hejma bieno kaj ĉiuj partoj de la Azilo estis priskribitaj detale kaj multe estis dirite pri la hospitalaj sekcioj en kiuj la pacientoj devus resti. Listo de la diversaj funkciuloj estis donita, de la Ĉefa Kuracisto ĝis la subulaj membroj de la kunlaborantaro. Iliaj devoj kaj eĉ salajroj estis menciitaj. La bonstato de la paciento estis la respondeco de la grupo de indaj individuoj kiuj devis certigi bonajn kondiĉojn de la azilo sub la Medicina Oficisto. Granda zorgo estis prenita por certigi ke la kosto al la publika monujo estis konservita je racia nivelo kaj kvankam la dieto de la pacientoj estis tre ordinara, ĝi estis sufiĉa por satigi malsaton kaj estis probable multe pli bona ol estus havebla al ili ekstere la azilo.

Specifaj malsanoj kaj iliaj kuracadoj estis diskutitaj. Multaj

pacientoj venis el la militistaro, karceroj kaj malriĉulejo. Ili suferis pro manio, depremiĝo, demenco, idioteco, ĝenerala paralizo de la frenezo, pro sifiliso, kaj drogmanio. Traktado estis ĉefe por doni al la paciento ŝancon vivi sanan vivstilon, havi freŝan aeron, sekuran medion kaj utilan laboron.

Drogoj uzataj por trankviligi la maltrankvilajn aŭ bruajn pacientojn estis morfino, klorala hidrato, kokaino kaj kanabo. Notindas ke ĉiuj tiuj medikamentoj estis facile disponeblaj en apotekoj kaj ekzistis neniu leĝo kontraŭ ilia vendo. Ebrieco kaj droga misuzo abundis kaj ne estis limigita al la plej malaltaj klasoj, kvankam la riĉuloj  ricevis, plej probable, kuracadon private, prefere ol en publika azilo.

Viroj kaj virinoj estis strikte apartigitaj, krom ĉe foja koncerto aŭ danco, ĉar oni pensis ke estas neprudente meti tenton en ilian vojon, aŭ krei tro multe de ekscito. Ĉe manĝo-tempo la manĝilaro estis kalkulita antaŭ iu forlasis la manĝejon en la kazo ke objekto povus esti uzata kiel armilo. Oni pensis, aŭ eble esperis, ke per tiu medio, la plejparto de la pacientoj povus rekomenci sian vivon en la komunumo.

Kiel mi jam diris, mi deziris kompari la Viktorian Azilon kun kondiĉoj en la mensaj malsanulejoj de la nova Nacia San-servo dum 1950. Kiam mi komencis dungadon kiel studenta flegisto en Woodilee Mental Hospital en 1955 kaj retrospekte, mi trovis ke kondiĉoj estis kiel antaŭe priskribitaj. Kiel juna knabo mi ofte vizitis la Woodilee Azilon kaj vidis multajn el la pacientoj vagantaj tra la bieno.

Mia amiko kaj mi serĉis falintajn kaŝtanojn inter la arboj. La priskribo donita en la Viktoria manlibro estis identa kaj la interno de la konstruaĵoj estis simila, kvankam estis pli da maŝinoj haveblaj en la lavejo kaj la hejtado estis multe plibonigita. Estis bona fleglerta lernejo en kiu studentoj studis dum tri jaroj por preni la ekzamenon,

kaj se sukcesinta, fariĝi registrita mensa flegisto.

Oni uzis electro-ŝokan terapion kaj profundan insulinan terapion, sed nuntempe tiuj ŝajnas primitivaj kaj ja estis katastrofoj en multaj kazoj. Operacio nomita antaŭfrunta lobotomio estis pli malofte efika. Ĝi konsistis el trepanado de la frunta parto de la kranio kaj enkonduko de instrumento por apartigi la nervojn de lobo de la cetero de la cerbo. Malmulte el tiuj traktadoj oni povus konsideri sukceson kaj ili kaŭzis grandan mizeron kaj eĉ morton al tiuj mizeruloj. Multaj el la pacientoj estis enlite dum iom da jaroj. Tamen taĉmentoj de taŭgaj pacientoj poluris la etaĝojn, laboris en la hejma bieno kaj lavejo kaj faris aliajn diversajn taskojn por la malsanulejo. Ili estis bone manĝigitaj, razis kaj banis regule. Ili estis tre ofte gvidataj por piediroj ĉirkaŭ la grundoj, sed kapo kalkulado estis bezonata ofte ĉar ĉiam estis danĝero de ilia eskapo. Kelkajn jarojn poste mi komencis labori en Woodilee; ekzistis kelkaj progresoj faritaj en drogo traktado kaj tute transformitaj kondiĉoj por la frenezuloj. Pacientoj, kiuj estis dormantaj kaj demencaj dum jaroj, leviĝis el siaj litoj kaj marŝis. Iuj povis labori, konduti tute prudente kaj povis esti liberigitaj. La aŭtoritatoj fermis multajn el la mensaj malsanulejoj. Bedaŭrinde, ‘zorgo en la komununo’ estis mankohava kaj estis la kaŭzo de granda mizero. Kvankam mi povis kompari la Viktorian Azilon kun mia propra sperto kaj trovis grandajn similecojn, mi dubas ĉu la traktado priskribita en la manlibro estis tiel humane kiel oni sugestis, sed mi esperas sincere ke miaj duboj estas senbazaj.

*Donald Robertson*

# Feriaj Kontrastoj

Pastel de Nata, la plej bongusta kiŝo iam ajn manĝita, kaj mirindaj bieroj spicumigas miajn memorojn de tri belegaj semajnoj en Eŭropo. Se temus nur pri Universala Kongreso en Lisbono estus jam multa priskribinda sed plia semajno en Porto, duona semajno en Kirchheim kaj aldonaj tagoj en Lisbono faris tiun ĉi kongreso-ferion unika kaj variplena evento.

La aventuro komenciĝis kiam mi anoncis al mia edzino ke mi intencas iri al la UK ĉi-jare. Ŝia kutima respondo al tia anonco estas ne voli akompani min, sed kiam mi informis ŝin ke ĝi okazos en Lisbono, ŝia intereso ekpikiĝis. Kompreneble. Ĝi estas vere vizitinda kaj esplorinda urbo. Ĉio enorda, do, ĝis mi laŭtlegis la datojn kaj ni malkovris ke la malfermo de la kongreso konfliktos kun la 90a naskiĝdatreveno de ŝia onklino en Germanijo. Por ferioj ni ĝenerale aĉetas nur flugojn kaj memaranĝas loĝlokojn, evitantaj tutinkluzivajn feriaranĝojn. Sed la ĉi-foja estos unu el la plej ne-ordinaraj ferioj kiujn ni iam faris.

Nia fluga itinerio estis jena: per Ryanair al Porto; per Easyjet al Ŝtutgarto; per Eurowings al Lisbono; kaj fine reen al Edinburgo de Porto per Ryanair. Intertempe okazis tre ĝuindaj spertoj en Porto, en Kirchheim, kaj en Lisbono.

La loĝejo en Porto estis tre bela moderna apartamento mendita pere de *Airbnb*. Ĝi situis en bloka konstruaĵo kies enireja halo, pro grandaj fenestroj aspektis kiel hotela akceptejo, kun plantoj kaj sidlokoj konvene lokitaj. La ĉirkaŭaĵo, tamen, ne belis, estante distrikto de nove konstruitaj apartamentaj loĝejoj, sen lokaj vendejoj, kafejoj, restoracioj, aŭ trinkejoj. Ni bonŝancis en tio, ke for de nur kvin minuta piediro troviĝis *Norte Shopping*, laŭpretende la

plej granda aĉetocentro en norda Portugalijo. Se plaĉis al vi tiaj lokoj ĝi estis vere impona kun du ĉionvendejoj, unu el kiuj estis vere granda, kaj multaj vendejoj de konataj markoj modernaj.

Plej bone estis tio ke per du minuta promeno ni povis atingi la metroon de Porto, kaj post kvin minuta vojaĝo alveni al la centro de la urbego. La metroo estas iom unika ĉar oni konstruis ĝin ne subtere sed preskaŭ tute surgrunde. La vojoj tamen iras ne laŭ la stratoj kiel tramo sed laŭ asignitaj trakoj – plejparte – tiel ke la vagonaroj povas atingi staciojn sen la ĝeno de trafiko.



*Fama plado de Porto - Fransesinjo*

La unuan tagon ni vojaĝis per ĝi al la stacidomo *Trinidade* apud la urbocentro. Piedirante malsupren en la direkton al la rivero ni

preterpasis restoracion ofertantan la pladon *Francesinha* (pron. *fransesinja*), kaj, jam leginte pri ĝi, decidis provi. Ĝi estas Porta disvolvo de la franca *Croque Monsieur* kaj konsistas el tavoligitaj pano, malseke peklita ŝinko, fumaĵita kolbaso, kaj steko, kovrita de fandita fromaĝo verŝita de pika saŭco el tomato kaj biero. Oni servas kutime kun terpomfingroj. Dufoje dum nia vizito ni manĝis fransesinjon kaj, post la dua, konstatis ke jam sufiĉe da tiuj ni enbuŝigis. Malgraŭ tio ke plaĉas al ni la gustoj de ĉiuj elementoj de la sandviĉo, estas io supersatiga pri la kombino. Por mi la blanka ne-rostita pantranĉo kovrita de fromaĝo kaj saŭco ŝajne kaŭzas iel la problemon.




*Maltantaŭa fenestro akustika de la Koncertohalo*

Estis multegaj vidindaĵoj en Porto, tro por eta artikolo, do mi elektos du. La *Casa de Musica* (Domo de Muziko) estas vere impona kaj tre plaĉa moderna konstruaĵo, kies eskstera formo similas krudan diamanton. La plankoj estas ĉiuj faritaj el aluminio. La muroj estis el betono sed ofte aperis vitro fojfoje muldita en la

formon de ondoj pro ne nur estetikaj kialoj sed ankaŭ akustikaj. La ondolongoj de la fenestroj ĉe la antaŭa kaj malantaŭa muroj de la ĉefa koncertoĉambro estas tiaj ke ili dissendas reflektitajn sonojn en ĉiujn direktojn tiel kaj la muziko sonas egale bona de kie ajn en la ĉambro. La estetika efiko ankaŭ estas belega: la antaŭa muro, malantaŭ la muzikistoj, donas perspektivon de la urbo Porto mem kiel fono por la orkestro. Mi demandis al la gvidantino ĉu oni faris la plankojn el aluminio pro akustikaj kaŭzoj ĉar mi scias ke oni povas konstrui violonon el aluminio. Ŝi diris ke efektive ne, nur ĉar plaĉas al la arkitekto tiu materialo. Mi demandis, do, ĉu pro rego de temperaturo, ĉar aluminio bone kondukas varmon. Ŝi respondis denove ke ne, kaj efektive rego de temperaturo estas problemo pro la fenestroj kaj la plankoj. Ŝajnas ke mondfama arkitekto el nederlando, *Rem Koohaas*, ne sufiĉe komprenas la klimaton de norda Portugalijo. Bonŝance ni vizitis la domon dum, ĝis tiam, unu el la plej malvarmaj someroj en Portugalijo.

La alia vidindaĵo kiun mi priskribos estas la *Igreja de São Francisco* (Preĝejo de Sankta Francisko). Ĝia ekstero estas plejparte gotika, kaj ne tre belaspekta. La interno de la ĉefa mesoĉambro estas pleje ornamita laŭ la baroka stilo per detale ĉizita ligno, kiun oni originale supertavoligis per orfolio. Hodiaŭ nur la altaj partoj restas plene orkovritaj. Sur la malaltaj ĉizitaĵoj restas nur spuroj de oro kaj ili aspektas pli brunaj ol orkoloraj. La efekto, tamen, estas fascina. Oni sentas ke oni staras en kaverno kies volboj eroziiĝis, lasantaj sur siaj surfacoj etajn kavaĵojn kaj elstaraĵojn tiom multnombrajn ke la okulo ne kapablas kapti ĉiujn per unu, eĉ longa, rigardo. Dum mi travagis la ejon mi trovis min kvazaŭ ĉirkaŭata de komfortiga atmosfero sekura – kiu estis surprize, ĉar kutime mi ege malŝatas la tro-ornamecon de barokaj preĝejoj.

Kiam ni lasis tiun parton tra apudaltara pordo kaj trapromenis

flankan muzean alon por iri esplori la kripton mi vidis altan sveltan viron kun hipiecaj frizo kaj vestoj kiu sekvis aliajn homojn en la ĉefĉambron. Alproksimiĝinte al la grupo mi pensis ke li aspektas ege simila al Bob Geldof. Por esti certa mi diras al mia edzino ke mi iros kontroli. Do mi retreniris tra la muzeeto ŝajnigante ke mi rigardas la artefaktojn ĝis mi finfine venis al la pordon el kiu mi ĵus venis. En ĝuste tiu momento aperis homo kiu estis sendube Kavaliro Bob Geldof, klare ne tiel fascinita de la orornamo kiel mi. Li preterpasis, kaj mi turnis min al la edzino kaj flustris ke mi volas saluti lin. Ŝi tuj kaj emfazi malpermesegis al mi eĉ pensi pri tio, dirante ke li estas en ferio kun familio kaj amikoj kaj ne deziras la ĝenon de malĝentilulo kiel mi. Mi ne scias kiel ŝi eksciis kio estas en la menso de la granda homo, sed mi obeis ŝin kaj sekvis ŝin al la kripto. Tie, kiel kutime, mi sentis la internan skueton kaŭze de la apudeco de mortaj homaj restaĵoj eĉ malantaŭ ŝtona ĉerkoflanko. Iujn tombojn oni povas superpaŝi ĉar ties kovriloj kun nomo, aĝo, aŭ mortodato pavimas la plankon de la kripto. El tiu morna atmosfero mi volis supreniri por revidi la Iberian sunon. Irante laŭ la elira koridoro jen denove mi vidis Bob Geldof, kiu nun descendas en la kripton kun alia viro. Mi sentis impeton ekparoli al li por eble ŝerceti pri la sombra ĉambro aŭ demandi lian opinion pri la ekstravaganco de la preĝejaj oraĵoj. Sed min ankoraŭ efikis la edzina ordono respekti la feritempon de alia homo. Nu, tiu vesperon ni malkovris ke okazas tritaga festivalo en Matesinhos apud Porto por honore celebri la centan datrevenon de la naskiĝo de Nelson Mandela. Do Bob estis en Porto labore ne ferie! Ĉu tiu fakto ŝanĝus lian sintenon al ia alparolo mia en la preĝejo, mi ne scias. Mi ne telepatias tiel bone la menson de famuloj kiel povas la edzino.

En ordinara ferio oni restas ĝenerale en la sama lando, sed kiel jam menciite, ni volis ĉeesti la 90-an naskiĝtagan datrevenan feston de la onklino de mia edzino. Tial ni vojaĝis al Kirchheim unter Teck,

la familia urbo. Kion diri ne jam dirita al skotaj Esperantistoj pri tiu ĉi urbo? – bela kun tradicia mezepoka centro nur 23 kilometrojn for de la ŝtutgarta flughaveno. Kiam ni ĉifoje vizitis ĝin, alvenis al Eŭropo la unuaj tagoj el la plej varma vetero de la somero. En tia vetero on devas ĝui belajn germanajn bierojn, do kial ne en loka bierfarejo, kiu super sia enirejo montras la jenan devizon: *Bier ist der lebende Beweis dass Gott uns liebt und möchte dass wir fröhlich sind* - Biero estas la vivanta pruvo ke Dio amas nin kaj volas ke ni estu feliĉaj?

La apartamento en kiu ni loĝis havis grandegan balkonon sur kiu ni povis ĝui malstreĉiĝon posttagmeze, akompanataj kompreneble de la pruvo de dia amo, kaj vespere serĉi la noktan ĉielon por vidi la superpasantan internacian spacostaciujon. La sabaton de la komenciĝo de la UK ni festis la 90an datrevenon de la onklino en kampara resoracio apud ĉevalejo. Nia ĉeesto el fora lando estis por la onklino, laŭ ŝi, la nura donaco de ni kiun ŝi deziras. Feliĉaj ni reiris la sekvan tagon al Portugalijo, ĉi-foje al Lisbono.



*Statuo de Kristo la Reĝo vidata de nia apartamento*

Dum mi ĉeestis la kongreson mia edzino travagis la ekstercentrajn kvartalojn de la ĉefurbo ĉar la homojn, la kafejojn, la parketojn kaj vidindaĵojn ŝi ĉiam preferas ol la tro turistojplenajn lokojn en la urbocentro. Ni luprenis subtegmentan apartamenton, kiu do donis mirindan perspektivon super la tegmentoj de Lisbono ĝis la rivero sude kaj la statuo de Kristo la Reĝo sur la suda flanko de la rivero Tagus. En la vesperoj estis bele rigardi en la fora distanco la surteriĝajn lampojn de la aviadiloj kiuj celas al la flughaveno de Lisbono. Tiuj flugis de dekstre maldekstren ĝis ili venis preskaŭ al la statuego, ŝajnis halti dum ili turnis sin en nian direkton, kaj turnis denove maldekstren por preterflugi nian vidspacon de maldestre dekstren, antaŭ ol malaperi malantaŭ ĉielskrapaj konstruaĵoj por fine surteriĝi en la flughaveno. Post kelkaj minutoj oni povis aŭdi la muĝon de la retropuŝaj motoroj kiuj bremsas la aviadilon sur la kurejo.

Estis trankvile aŭdi tiujn muĝojn de nia balkono pro la interkuŝa distanco. Estis tute alie ĉe la kongresejo en la jura fakejo de la Universitato de Lisbono. Sidante ekstere apud studenta manĝejo oni subite surdiĝas pro la laŭto de la jetoj kiam granda flugmaŝino plena je pasaĝeroj superflugas nur iomete flanke de la universitata tereno. Feliĉe tio ne okazis tre ofte – almenaŭ dum miaj sidoj ekstere – kaj interne de la granda konstruaĵo oni simple ne aŭdas la bruon. Mi venis al la kongresejo pere de duŝanĝa subtera metroa vojaĝo trans entute sep stacioj, do mi ne havis klaran bildon pri la orientiĝo de la Universitato rilate al la apartemento. Sed nun, post aŭdi la unuan superflugantan aviadilegon, mi ekhavis klaran bildon, ĉar mi jam vidis de la balkoneto precize kien iris la aviadiloj antaŭ ol surteriĝi.

Malkiel dum aliaj universalaj kongresoj mi partoprenis nur

manplenon da programitaj eventoj. Pli granda plezuro por mi estis renkonti esperantajn geamikojn kaj novajn kaj jam malnovajn, por pasigi malstreĉan tempon kun ili. Ĉefe inter tiuj estas la geamikoj el Vigo en norda Hispanio. Mi kovis etan esperon ke iuj ĉeestus, ĉar por ili estas tute facile veni al Lisbono, kaj ofte faras, kiel ni, ekzemple vizitus eble Londonon. Kia ĝojo tute hazarde renkonti unun post la alia, sen ia ajn provo, dum sencela vagado tra la koridoroj de la kongresejo.

Estis eĉ plia ĝojo ke tiuj ĉeestis mian etan parolon dum unu el la tiel nomataj *Aŭtoraj Duonhoroj*. Mi ne sciis pri tiuj ĉi antaŭ ol vidi la programon, ĉar ili ne ekzistis dum la lasta UK kiun mi partoprenis. Sed malkovrinte ilin, kaj estante jam aŭtoro, mi ĉeestis plurajn. Mi ankaŭ volas danki al *Sara Spanó* kiu bonkore permesis al mi enŝovi mian duonhoron en jam plenan programon malgraŭ mia tre lastatempa peto pri tio.



*Fontano en Placo Martim Moniz, Lisbono, en kiu povas ludi Infanoj*

Post la kongeso la edzino kaj mi restis tri pluajn tagojn por kune esplori la urbon.



*La Ruinoj de la Karmelana Monaĥinejo*

Lisbono estas alia ol Porto. Dum Porto havas antikvan centron, kiel havas ankaŭ Lisbono, ĝi havas multajn pli modernajn distriktojn. Ĝi havas novan modernan metroon, kaj estas indikoj ke Porto nun pli riĉiĝas ol en la pasinteco. Tiu sento ne estas tiom facile videbla en Lisbono kvankam estas konate de la ekonomio de Portugalijo komencas kreski kaj plifortiĝi pro la decido de la registaro malobei la politikon de la Eŭropaj bankoj. La registara portugala forĵetis la politikon de severa ŝparemo pri publika elspezo, kaj jam la rezultoj pruviĝas bone. Se oni volas stimuli la ekonomion la registaro elspezu monon.

La plejparto de Lisbono detruiĝis dum la tertremego de 1755, kaj oni devis rekonstrui la plejparton. Oni lasis tamen la ruinojn de la karmelana monaĥinejo por memorigi al travivintaj Lisbonanoj pri la detruego. Dum vizito al la ruinoj apud la urbocentro, mi malkovris kuiran sekreton de Lisbono. Estis jam post la lunĉa horo kaj mi ankoraŭ ne manĝis. Mi ne volis foti la ruinojn kun sento de malsato

do ni eniris kafejon en flankostrato per sensoifiĝi kaj manĝi. Bedaŭrinde ne restis multaj manĝaĵoj krom kiŝo, kiun mi ne kutime ŝatas. Ne havante bonan elekton, mi tamen aĉetis kiŝotranĉon. Kia bonŝanca akcidento. Ne nur estis la farĉaĵo tre bongusta, sed la murbo, kiu estas por mi la malalloga parto de britaj kiŝoj, estis ankaŭ tre gustumnda. Kiam ni vizitis alian parton de Lisbono, la distrikton Graça, kie situas la *Castelo de São Jorge* (La Kastelo de Sankta Georgo), okazis same. Ni eniris etan kafejon por preni lunĉan manĝeton. Mi vidis en la manĝomontrujo malgrandajn rondformajn kiŝojn kaj elektis unu. Ho, kia bona gusto. Tiom bona ke mi duan aĉetis. Mi decidis surbaze de tiu eta esploro ke ne temas pri hazarda trafo de unika recepto en la apudmonaĥeja kafejo, sed ke kiŝoj portugalaj diferencas de la britaj. Reveninte hejmen kaj farinte esploron mi malkovris ke la diferenco estas tio, ke oni uzas buteron anstataŭ grason, kun opcia aldono de ajlo, parmezano, aromherbo, aŭ citrona suko.



*Monaĥinejo de Graça kaj Kastelo de Sanktulo Georgo*

En Graça mi ĝuis alian fenomenon gustumindan, ĉi-foje lastatempan. En Porto mi jam malkovris en ĉiovendejoj la metifaritan bieron *Urraca Vendeval* (Ventega Pigo) de la bierfarejo

*Oitiva Colina* (Oka Monteto). Ni malkovris ke la farejo situas en Graça kaj prenas ties surbotelan logoon de monaĥineja kapela turo videbla sur la monteto de Graça, kaj ke la firmao havas trinkejon kies fenestroj elrigardas al la turo. La trinkejo estis tute nova, indikante la novecon de la lastatempe eksplodanta fenomeno en Portugalijo, nome la populareco de metifaritaj bieroj. Antaŭ kelkaj jaroj ni trovis en la hispana urbo Ronda trinkejon specife dediĉitan al metifaritaj – do bongustegaj – bieroj. En Porto en la distrikto Matesinhos la antaŭan semajnon ni trovis, efektive je la tago de ĝia malfermiĝo, similan trinkejon. En Lisbono survoje al la distrikto Graça estis alia trinkejo kiu fermentas sian bieron en la kelo de la trinkejo mem. Tiu ĉi fenomeno, ege bonvena, ŝajne kreskegas en Iberio. Mi ĝojas ke la modo aperis multajn jarojn antaŭe en Skotlando pro la marko *Brew Dog*, kiu estis pionira en tiu ĉi trinka furoraĵo.




*Urraca Vendeval*

Sed fine pri manĝaĵo. Fama estas la portugala frandaĵo *Pastel de Nata* kiu konsistas el malgranda flokeca tortofunda murbo plenigita per dolĉa laktovaĵo. Oni bakas ĝin je alta temperaturo kiu karameligas la surfacon de la laktovaĵo kaj kraketigas la tortofundon. Nu, ni aĉetis multajn dum nia restado en Portugalijo, en kafejoj, el vendejoj; iuj pli bonis ol aliaj, sed tiuj kiuj estis plej bongustaj laŭ mia distingakapablo estis tiuj aĉeteblaj en la studenta manĝejo de la jura fakejo de la Universitato de Lisbono – nia Universala Kongresejo!

*Hju Rid*

# Turismo

## Enkonduko

Turismon oni difinas kiel agon de forlaso de ies domo por rilaksado, distriĝo, plezuro aŭ laboro, dum oni utiligas provizojn kaj servojn de cel-lokoj.Turismo povas esti nacia aŭ internacia. Krom esploraj kaj plezuraj vojaĝoj ekzistas ankaŭ komercaj vojaĝoj, medicinaj, religiaj, sportaj, vintraj, volontulaj, vojaĝoj al variaj eventoj kaj simile.

Vojaĝado estis parto de aktivecoj jam en la frua homa historio. En Egiptio oni menciis la vojaĝadon jam en 1500 AK. Dum Greka kaj Romia tempoj kuracejoj kaj apudmaraj lokoj estis frekvente uzitaj de riĉuloj. En postaj tempoj la modo de vojaĝado dauris. Riĉaj junuloj, precipe, vojaĝis al distancaj lokoj por viziti elstarajn konstruaĵojn, artaĵojn, lerni la lingvon, sperti novajn kulturojn kaj gustumi fremdan kuiradon.

Tiu-speca vojaĝado daŭris de 1660-aj jaroj ĝis eble 1840 kiam alvenis fervojoj. Ripozvojaĝado estas ligita al la industria revolucio kaj Britio estis la unua lando kiu antaŭenigis ripoztempon por kreskanta industria loĝantaro. La unua oficiala vojaĝagentejo en Britio aperis sub la nomo de *Cox and Kings*.

Komercisto *Thomas Cook* komencis oferti trajnajn ekskursonjn por plezuro kaj poste rapide formis sian propran komercan entreprenon, prenante procenton da mono de venditaj fervojaj biletoj.

Al kresko de vojaĝado kontribuis ankaŭ konstruado de grandaj luksaj pasaĝeraj ŝipoj, aŭtomobiloj kaj poste aviadiloj.

En la fruaj tagoj la vojaĝado estis simpla kaj baza, sed nuntempe ĝi tute ŝanĝiĝis. Vojaĝantoj serĉas pli specifajn kaj novajn, jam

neesploritajn lokojn. Tiuj turistoj estas nun pli aventuremaj, pli spertaj, sendependaj kaj kun pli da mono.

**Endanĝeritaj pejzaĝoj kaj turistaj allogaĵoj kiuj 'mortas'**

Kelkaj ekzemploj de hom-kreitaj problemoj.

La lokoj allogis turistojn dum cento da jaroj kaj samtempe kunportis prosperon al tiuj lokoj. Nun la granda enfluo de vizitantoj, malrapide minacas la ekziston de vidindaĵoj kaj la lokan prosperon. Pro daŭra kresko de la loĝantaro, ŝancoj estas ke malpli da lando aŭ maro estos protektitaj de homa influo, precipe ĉar homoj kontribuas ankaŭ al la klimata ŝanĝo. Korala senkolorigo, trovata en multaj lokoj, estas rekta rezulto de la klimata ŝanĝo kaj tro multaj turistoj.

**TAJ MAHAL apud Agra, Hindio**

Ĝi estas la marmora maŭzoleo, konstruita en la 17a jarcento far imperiestro Shah Jahan memore al sia edzino Mumtaz. Ĝi ricevas eĉ ĝis 70.000 vizitantojn potage. Tro multaj vizitantoj kaŭzas eluziĝon de la tombo. Ilia pezo kune kun la falo de la akva nivelo en la proksima rivero, efikas al lignaj fundamentoj de la konstruaĵo. Jaroj de karbo eligaĵoj de la urbo Agra kaŭzis miskolorigon de iam blankaj muroj. Por solvi la problemon, hejmvizitantojn oni limigos al 40.000 potage sed la eniro de fremdaj vizitantoj ne estos limigita

**SISTINE KAPELO, Vatikano**

La Kapelo situas en la oficiala Papa loĝejo kaj enhavas la plej

signifajn Renesancajn artaĵojn. La plej famaj pentristoj kiel Botticelli, Roselli kaj Michelangelo pentris freskojn kaj komplikajn scenojn sur murojn kaj plafonon en la 15a jarcento kaj komence de la 16a jarcento. Kvankam la fotografado ne estas permesata, la kvanto de elspirata karbona dioksido damaĝas la arton. La aŭtoritatoj instalis specialan specon de aersistemo por helpi enkonduki taŭgan medion.

### STONEHENGE, Britio

La misteraj ŝtonoj de Stonehenge datumas de ĉirkaŭ 3.100 AK. Pro multnombraj vizitantoj, damaĝo estas severa. Ĉizado en ŝtonoj estas ofta, pecetoj de ŝtonoj estas formovataj kiel memoraĵoj kaj tio postulas regulan riparadon. La efikon de la proponita tunela aŭtovojo sub la ŝtonoj povas montriĝi eĉ pli damaĝa.

### LA ĈINA MURO

Ĝi estas unu el la sep mirakloj de la mondo. 21.196 kilometrojn longa fortifikaĵo en la norda parto de la lando estis konstruata dum multaj jaroj, inter la 8a AK ĝis regno de Ming Dinastio (1368-1644).

Ĉirkaŭ 30% de la muro estis detruita pro natur-kaŭza erozio kaj ankaŭ la homa aktiveco, kiel surskriboj sur muroj kun akraj objektoj, ŝmiritaj grafitioj kaj formovado de ŝtonoj kiel memoraĵoj. Post 2014, la registaro kreis specifajn lokojn por murskribaĉaj grafitioj.

### TUTANKHAMUN TOMBO, EGIPTO

Post eltrovo de la tombo far Howard Carter en 1922, li ne intence malkovris ĝin al la ekstera malpura aero. Miloj da vizitantoj

kontribuis al ĝia difektiĝo ĝis tia grado ke la registaro kreis kaj malfermis detalan kopion de la faraona ĉambro en la proksimeco. Tamen spite tion, la originala suferas pro la arkeologia aktiveco ĉar oni daŭre serĉas por la ĉambro de la reĝino Nefertite.

**MACHU PICCHU, Peruo**

Machu Picchu estas la malkovrita ĉefurbo de la Inkaa civilizacio, konstruita en la 15a jarcento sur alteco de 2.430 metroj super la marnivelo. Post ĝia eltrovo en 1911, la nombro da vizitantoj kreskis ĝis la timiga nivelo, duono de miliono po jare. La rezulto de tio estas ke konstruaĵ-strukturoj malfortiĝas kaj estas malfermitaj al poluado. Machu Picchu devus eniri la liston de UNESCO kiel protektita monda heredaĵo por konservi ĝin.



*Machu Picchu la ĉefurbo de la Inkaa civilizacio*

**MONTO EVEREST**

La plej alta monto en la mondo kun alteco de 8.848 metroj fariĝis tre populara grimpopunkto kio kreis ege grandajn problemojn, kiel ekzemple: postlaso de rubaĵo, plastiko, aluminiaj skatoloj, vestaĵoj, papero, eluzitaj oksigenaj ujoj kaj grimpekipaĵo. Tunoj da ekskremento estas postlasitaj post ĉiu grimpanta sezono. Ŝerpoj estas pagataj por purigado de la monto dum helikopteroj levas pezan materialon.

**VENECIO, Italio**

Roma arkitekturo kaj romantikaj veturoj en gondoloj allogas milionojn da turistoj ĉiu jare. Plenŝtopita urbo kun tiom da vizitantoj kaj polucio endanĝerigas kanalan ekosistemon kaj delikatajn konstruaĵajn fundamentojn. Multajn leĝojn oni enkondukas por plibonigi la situacion kiel ekzemple: malpermeso de manĝado sur la strato, enmeto de piedoj en kanalon, sidi aŭ kuŝi sur la grundo. Oni ne rajtas porti alkoholon en la sako post la sepa horo vespere. Oni ankaŭ limigos la nombron de grandaj krozŝipoj. Pro la problemoj kun vizitantoj, la originala loĝantaro de Venecio forlasas la urbon kaj la nombro de la loĝantoj nun ests nur 55 miloj.

**GALAPAGOS INSULOJ EN PACIFIKO, Ekvadoro**

Tiuj volkanaj insuloj estas ligitaj kun Charles Darwin kaj la teorio pri la evoluo. Hoteloj kaj alispecaj loĝejoj difektas la naturan ĉirkauaĵon kio disrompas bestan paradizon tie.

Similaj problemoj pro la homa agado okazas ankaŭ en aliaj partoj de la mondo.

Protestoj kontraŭ amasa turismo okazis ĉi-jare en Barcelona kaj

Majorca, Hispanio. Malia kaj Ibiza deziras nun akcepti nur pli da familioj ol grupoj de junuloj.

Oni legas ke Oxfordo estas ‘turista infero’ dum la somero. Polico sur la insulo Skye avertas homojn ne veni sen antaŭe rezervitaj loĝeoj ktp. La listo estas tro longa por mencii aliajn lokojn en kiuj turismo malfortigas la ekonomion, lokajn kulturon kaj morojn.

**STATISTIKO**

La tabelo sube montras la nombron da vojaĝantoj al individuaj landoj. Ĝi montras ke en 2017 plej multajn vizitojn ricevis Francio kun 86.9 milionoj po jare, dum Britio vizitis 37.7 milionoj.

Internaciaj turistaj alvenoj en 2017

| LANDO | VIZITANTOJ (en milionoj) |
|---|---|
| Francio | 86.9 |
| Hispanio | 81.8 |
| Usono | 71.9 |
| Ĉinio | 60.7 |
| Italio | 58.3 |
| Meksikio | 39.3 |
| Britio | 37.7 |
| Turkio | 37.6 |
| Germanio | 37.5 |
| Tajlando | 35.4 |

Eŭropo ricevas plej multajn internaciajn turistojn. Ili supozeble kontribuas al la loka prospero, kreas labor-lokojn kaj haltigas industrian aŭ kamparan malkreskon. La infrastrukturo kreita por turistoj utilas ankaŭ al la loka loĝantaro.

Feriante turistoj elspezas multan monon. Vojaĝantoj el Ĉinio elspezas multe pli da mono ol la vojaĝantoj el aliaj landoj. Laŭ la informoj pri feriaj elspezoj, Britio troviĝas je la kvara loko. En la pasinteco elspezoj de Britoj estis pli grandaj, precipe dum la tagoj kiam Britoj ekskursis al la proksimaj landoj de Eŭropo por aĉeti alkoholon kaj cigaredojn, kio ĉesis en 1999. La falo en la valoro de la pundo ankaŭ kontribuis al la falo de elspezoj de Britoj kaj la daŭro de ferioj mallongiĝis. Anstataŭ ol la du-semajna ferio, la plej populara estas nun nur unu semajna ferio.

Krom pozitiva efiko turismo ankaŭ kunportas negativan efikon. Amasa turismo havas la plej grandan negativan efikon. Hodiaŭ pli 'amikemaj' vojaĝantoj konsideras la efikon je la ĉirkaŭaĵo, la ekosistemo kaj kiel sukcese la regiono kapablas daŭrigi kun ĝiaj tradicioj.

Nerezistebla homa deziro vojaĝi, esplori kaj gajni novajn spertojn subapogas la konstantan kreskon por vojaĝado kaj turismo. Iamaniere oni devas solvi la problemojn ĉar ne eblas haltigi aŭ eĉ malpermesi vojaĝadon.

*Mia Casey*

## Ferio En Orkadio

Dum ĉi tiu somero, julion, mi kaj Johano, la kunulo de mia filino, havis mallongan ferion, kiam ni vizitis *Orkadion*. Mardon la trian de julio ni vojaĝis per aŭto al *John o'Groats*, ĉe ekstrema norda kabo de Skotlando. Survoje ni vizitis la *Cairngorm* montojn, kie ni havis lunĉon en la centro por la turistoj, kaj poste ni promenis laŭlonge de pitoreska lago. Finfine ni atingis John o'Groats, kie ni loĝis en la Seaview hotelo, kiu estis tre komforta, kaj la manĝoj estis tre bongustaj. La vetero estis tre varma, kaj estis belega sunsubiro.

Merkredon ni eniris la pramŝipon en kiu ni vojaĝis al *South Ronaldsay*, unu el la Orkadaj insuloj, kie ni trafis la aŭtobuson por la rondvojaĝo de Orkadio. Unue ni vojaĝis al *Kirkwall*, la ĉefurbo de Orkadio, kie ni vizitis la belegan katedralon de *Sankto Magnus*. Ĝi estas tre granda kaj estis konstruita dum la dek-tria jarcento: tre interesa kaj alloga konstruaĵo. Apude ni trovis malgrandan sed belegan ĝardenon. Poste ni vojaĝis al *Scapa Flow*, kie ni ofte haltis ĉe pluraj vidpunktoj por fotografi la vidaĵojn. Krome oni montris al ni la lokon kie la batalŝipo 'Royal Oak' malleviĝis. Baldaŭ ni atingis Stromness, kie ni havis lunĉon apud la haveno. La suno brilis dum nia tagmanĝo. Poste ni vojaĝis al *Skara Brae*, kie ni vidis la neolitikan vilaĝon kaj oni montris al ni videon pri la neolitika vivostilo. Krome ni vidis la belegan marbordon apudan, kie multaj infanoj ĝuis ludi. Poste ni ĝuis viziton al la imponaj starantaj ŝtonoj de *Stenness*, ĉirkaŭ kiuj estas senŝirma stepregiono. Vespere ni revenis al Kirkwall, kie ni vidis grandegan krozoŝipon, kiu alportis multaj turistojn al Orkadio. Finfine ni vizitis la interesan kaj unikan Italan kapelon, kiun dum la dua mondmilito Italaj kaptitoj konstruis. Post la rondvojaĝo de Orkadio ni revenis per la pramŝipo al John o'Groats por nia vespermanĝo.

Jaŭdon ni eliris de la hotelo kaj vojaĝis al *Dunnet Head*, kie ni vidis la grandegajn klifojn. Krome ni vidis tre multajn birdojn: estis fraterkuloj, trifingraj mevoj, urioj kaj mevoj – mirinda spektaklo! Poste ni vizitis *Dunnet Bay*, grandega sabla marbordo: ni promenis tre longan distancon laŭlonge de la golfo kaj vidis nur unu homon tie – belega kaj trankvila pejzaĝo! Poste ni vojaĝis suden al Forsinard, kie ni promenis mallongan distancon trans la stepregiono kaj ni vidis kelkajn cervojn. Finfine ni revenis tra Inverness. La vojaĝo estis tre longa sed interesa kaj pitoreska. Nia mallonga ferio estis tre ĝuinda, ĉar ni vidis tiom multajn interesajn kaj memorindajn lokojn kaj ni ĝuis la trankvilon ĉirkauaĵon.

*Norman Richardson*

# Kalendaro

**2 - 4. novembro**

Klaĉ-Kunveno Post-Somera, KKPS - en Hunsel, Nederlando.

Ĉu vi rajtas nomi vin esperantisto, se vi neniam ĉeestis la Klaĉ-Kunvenon PostSomeran? Organizas: Nederlanda Esperanto-Junularo - retadreso: kkps.klackunveno@gmail.com

**2 - 4 novembro**

Komuna Konferenco de IKEF - en Changzhou (Ĉanĝuo) okcidente apud Shanghai. Organizas: IKEF, Vivo Z.C.S

**5 - 6. novembro**

Sesio de KER-ekzamenoj - en Kotonuo, Benino.

Okazos sesio de KER-ekzamenoj, nivelo B2. Organizas: Scio Sen Bariloj kaj UEA. CP 9, 2416 Les Brenets, Svislando - retadreso: mirejo.mireille@gmail.com

**16 - 19. novembro**

14-a Meksika Esperanto-Kongreso - en Puebla, Meksiko, en la Universitata Centro pri Servoj.

Organizas: Meksika Esperanto Federacio. - retadreso: estraro@esperanto-mexico.org

**8. decembro**

Zamenhoffesto - en Vieno, Austrio. Prelegoj inter alie de Chuck Smith, la fondinto de Amikumu.

Organizas: Aŭstria Esperanto-Federacio kaj la Pola Instituto en Vieno. - retadreso: aef@esperanto.at

**14 - 16. decembro**

19-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj - en Bjalistoko, Pollando. Organizas: Bjalistoka Esperanta Societo. - retadreso: pwierzbowski@gmail.pl

**31. decembro - 5. januaro**

Novojarsk-2019 - Renkontu la Novan Jaron en la bon-etosa Novjar-Festo en Krasnojarsk, Siberio, Rusio!

Organizas: Evelina Elli Sokolova, rete: sevelina@mail.ru

**4 - 13. januaro**

Aŭstralia Kongreso kaj Somerkursaro - en Adelajdo, Aŭstralio.

Organizas: Aŭstralia Esperanto Asocio, GPO Box 2122, Melbourne VIC 3001, Aŭstralio. - retadreso: info@esperanto.org.au

**26 - 27. januaro**

Nacia kongreso - en Wellington, Nov-Zelando.

Organizas: David Ryan. - retadreso: info@esperanto.org.nz

**26. februaro - 8. marto**

13-a Internacia Himalaja Renkontiĝo - en Katmanduo, Nepalo.

Organizas: Nepala Esperanto Asocio, GPO Box:10518, Kathmandu, Nepal. - retadreso: nespa.1990@gmail.com

**2 - 9. marto**

Mediteranea Esperanto-Semajno - en Restadejo Val d'Esquiere, Les Issambres, Francio (Lazura Marbordo).

Organizas: Christine Graissaguel, Les Iles d'Or-A, 59 rue du Progres, FR-83600 Fréjus, Francio. - Retadreso: kris_grai@hotmail.fr, tel: +33 (0) 4 94 95 66 18

**2 - 9. marto**

26-a koruso staĝo - en Verniolle, Francio.

Organizas: Jorgos kaj Monik', Garrigues - Muelejo - FR-09600 Limbrassac. - Retadreso: tutpeko@aliceadsl.fr

**28 - 31. marto**

12-a Mezorienta Kunveno - en Kaŝano, Irano.

Organizas: IREA, 31, Ghang Daneshgah st. Tehrano. - Komisiono MONA de UEA, Renato Corsetti, 22St. Pencras Curt, HIgh Road, London N2 9AE, UK - retadreso: mezorienta.kunveno@esperanto.org - aliĝoj ĉe Annie Grente, anniegrente@hotmail.fr

**5 - 12. aprilo**

Ekskurso al Irano en Boruĝerdo - Irano.

Inf.: Irana Turisma Agentejo, s-ro Masoud Goodarzi, oni skribu rekte al li, li sendos ĉiuj informojn. m_tajikistan2004@yahoo.com

**11 - 15. aprilo**

20-a Israela E-Kongreso + MONA-kunveno en Eilat, Israelo kaj Akaba, Jordanio.

5 taga Verda festo ĉe la Ruĝa maro kun kunveno de MONA (Meza Oriento kaj Norda Afriko) en la apuda Akaba (Jordanio) 13-15.4. Kosto: po 150 euro. Poskongresaj ekskursoj 15-21.4 - Petra, Morta Maro, Jerusalemo, 22-24.4 - Haifa, Nazareto Akko Akaba 13-15.4.2019. Organizas: E-Ligo en Israelo (ELI) eli@esperanto.org.il

**25 - 28. aprilo**

9-a Azia-Oceania Kongreso de Esperanto - en Danang, Vjetnamio.

Organizas: KAEM, Komisiono de UEA pri Azia-Oceania Esperanto-Movado. - Retadreso: azia-oceania-komisiono@yahoogroups.com

Skanu la suban kodon por eki konversacion kun nia paĝo en Facebook

Skanu la suban kodon por trovi nian retejon